

PENSEO

N-ro 320

jun. / 2018

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Paulo Silas (Brazilo)



NACIO?

Jes, brazilanoj. Jes, nordorientanoj.
 Ne trompiĝu.
 Vi estas pli indianaj ol eŭropaj.
 Via facileco porti malmulte da vestoj.
 Via tupieco trametita en la toponimio,
 en la simplula slango.
 Brazilo de deliraj progresosaltoj kaj
 hekatombaj stumbloj.
 Mi vidas nacion de kabokloj.
 Belan nacion de pluretnaj socioj.
 Ni ĝoju kaj festu!
 Ni estas mestizoj. Ni miksiĝis.
 Ni ĝoju esti kiaj ni estas.
 Ni estu kiuj ni estas kaj forcedu al aliuloj
 la hontidan taskon paroli pri “la esenco de la
 nacio”.

BRAZIUJO FAŬS

*Caio verticalmente e me transformo em
notícia*

Carlos Drummond de Andrade

Vi povas fali, aviadilo,
 sed, nepre, se sen deco.
 Kun sensacia raportaĵo,
 kiu garantias maksimuman publikon.
 Kun la rajto vidi fotojn kaj videojn en
 1080-bildera kvalito.
 Kun formalaj kondolencoj de ŝtatestroj kaj
 famuloj.
 Kaj profitante la flankeniĝon de la nacia

atento

por senbrue kaj senreziste aprobi leĝon
 kiu metos sur la malriĉularon la pezon de la
 financa krizo.

Vi povas fali, Braziljo, sed lasu la federacian
 fetoron integra.

Tiberio Madonna (Italujo)




TAGA SCENO

Kaj la suno
 apostrofita de verdaj folioj,
 pendantaj
 de l' arb' ombranta
 staranta
 aŭstera,
 pentras per heleco la tagon.
 La suno,
 ĉirkaŭita de malpezaj flokoj
 de vato
 disŝutitaj lontanen kaj proksimen
 en la vakuo lazura,
 ridante kun viva energio
 super la mondo
 ĝojege
 radias sian fajron
 citronflava,
 kiu pli malfrue
 iom pli sube
 fariĝos oranĝa
 kaj koloros per tia tinkturo
 la tutan ĉirkaŭaĵon.
 La kvividad' de l' paseroj
 vestas per muziko
 la komponaĵon de koloroj
 brilantaj

kune ludantaj,
 kaj ornamas
 la pentraĵon
 per melodiaj fadenoj el oro.
 La floroj de l' herbejoj
 ankaŭ ili
 flavaj
 kaj oranĝaj
 kolorigis siajn petalojn
 imitante la sunon.
 Ĉiuj aferoj
 lumigitaj
 de l' ronda varma juvelo
 enamiĝis al ĝi ekstaziĝintaj,
 ĝin admirante
 en la ĉiel' de l' tago.



Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Vesto

Korp' estas vesto vivanta,
 kiun oni denaske gajnas.
 Jen ĉiutaga miraklo—
 poezie pri ĝi mi zorgas:
 pano, kiu nutras revon,
 kaj igas tolerebla tagon.



En ĉi tiu punkt' de l' vivo,
 fiere kaj ĝoje mi diras,
 ke mi kapablas ankoraŭ

mian korpon promenigi,
 Dum horoj plenaj de lumo,
 ĉu en urb' aŭ en kampar',
 mi deziras, ke ĝi trinku
 la tutan misteron bluan
 de ĉi matenoj aŭtunaj.

Juiz de Fora, 27/04/2018.

Flugantaj riveroj

Subite mi malkovris,
 ke ni estas mergitaj
 en nevidebla mondo
 de ondoj da poezio:
 aeraj riveroj flugas
 super niaj kapoj.

Riveroj el vapor' akva,
 naskitaj el oceano,
 nutradas Amazonion,
 kiu ilin renovigas:
 blovado, kiu karesas
 tiun cirkviton de l' vivo.

Juiz de Fora, 23/04/2018.

Wally du Temple (Kanado)



Tradicioj de la Amiŝoj

Mi vekigās en urbeto Amiŝa
 Centro de farmkulturado varia
 Kie kamparanoj arde bienumas
 Virinoj kun ŝtrumpoj nigraj, longaj jupejoj
 Viroj kun barboj maturaj, ŝelkoj elastaj
 Resistas kontraŭ influoj modernaj.
 Nenia monoagrikulturo monotonas
 Kampoj novalas
 Porkoj, bovinoj paŝtas ĉe nekulturata
 plugter'
 Rotacio de rikoltoj kutima afer'
 Maizo, milio, luzerno, tritiko

Pennsylvaniaj kampoj jen bunta stebaĵo.
 Trarigardante gastejan fenestron
 Subite mi aŭdas sonon 'klip klop, klip
 klope'
 De feraj hufŝuoj ritme sonritme 'klip
 klope'
 Antaŭ ol mi vidas kaleŝon nigran, ikone
 Amiŝan
 Dratradioj kirle kaŝitaj pro radrapidec'

Kaj aĝa presbitero per gvidperfektec'
 Bridas sian ĉevalon por halti
 Kaleŝon kiel aŭto
 En traveturebla memserva vojo
 Por depreni
 Monbiletojn de pagista maŝino
 Per plasta
 Debitkarto.

Mori (Usono)



AFORISMO (32)

La plej bona gvidanto
 sur la tero
 estas tiu, kiu savas popolon
 el mizero.

Malriĉa estas
 ŝajne riĉa persono
 kiu havas nenion,
 krom mono.

Male al animalo
 homo povas batali
 sen kialo.

Se homo estus
 kiel hundo fidela
 la vivo estus
 multe pli bela.

Ju pli grandanima
 persono,
 Despli afabla
 lia sinteno.

Kie senvaloras
 kamelo kaj mulo,
 valoro de azeno
 estas nulo.

 Fanatikulo
 nome de moralo
 ofte kondutas kiel
 animalo.

Kie okazas
 kruelaj bataloj
 unu aŭ du flankoj
 estas animaloj.

Danĝeras amikoj
 ruzaj kaj ĵaluzaj
 la ceteraj estas
 amikoj amuzaj.

Homo por forflugi
 el iu ajn kaĝo
 bezonas du flugilojn
 de saĝo kaj kuraĝo.

Batali kontraŭ
 maljusto kaj mizero
 nur eblas tie
 kie estas libero.

Homo Inter homaro
 estas kiel fiŝ'
 en la maro.

En la lando
 gvidata de etulo
 neniu rajtas esti
 pli granda ol nulo.

 Homo estas kvazaŭ
 eleganta animalo
 en la urbo-ĝangalo.

La plej sankta afero
 estas komuna laboro
 kontraŭ mizero.

Kie libero
 pli gravas ol pano
 tie ne kapabla regi
 tirano.

La plej centra esenco
 de ĉio
 estas informo kaj scio
 kaj tio estas Dio.

Oni provas ekspluati
 homojn sur la tero,
 ie nome de Dio
 alie nome de komunismo
 aŭ nome de libero.

Mizero sur la tero
 ne estas ekonomia
 sed politika afero.

Nek kapricaj
 nek malicaj personoj
 estas taŭgaj por
 politikaj postenoj.

Ekzistas homoj kiuj	kaj plumo	samkiel hieno.
plibonigas la mondon	eblas batali	***
per ĉiuj siaj paŝoj	kontraŭ mallumo.	Politiko
kaj estas homoj kiuj	***	estas arto
zorgas nur pri siaj poŝoj.	Pli bonas vivi	transformi malamikon
***	malplaĉe kiel azeno	al amiko.
Nur per lum'	ol vivi aĉe	

Papos Nascentes (Brazilo)



Poeto

Via malkombita rigard'
vertikaligas horizontojn
— marajn —
sen faligi navojn

Via freneza lingvaĵo
subirojn disbatas
— varmajn —
sen kaosa instalado
kaj sen astrojfalado

Via esto sentakta
dehiskas en unikaj
spacoj
spite al temp' diversa
lasu esti diversa
unuoj!

Fluspolitiko

sperto freneza kap-turne vekigita
marŝi iomete konfuze
dekstren la falo
refoje skandalo,
maldekstraj karuloj: "ĉu sen enkonduko?!"
skuo skandalo!

ve! maldekstruloj dekstruloj

ankaŭ vekigas kaj marŝas stumbe
maldekstren la falo
refoje skandalo

apenaŭ ĉe kolomboj dialogon mi provas,
forflugas ambaŭ. (pikilon mi ĵetas:
"vi flugu mi petas per unu flugil'!")

jam hejme hirundojn mi vidas
multope flugante – per ambaŭ flugiloj!
sendube flustrante: "bezonas navigi
ĉiun direkten alteriĝan klapon estigi
direkton min donas – meditu, stultulo!"

Liu Zongyuan (773 – 819)



Rivera neĝo

Jam ĉesis birda flugo super mil-monta sfero,
Sin kovris homaj spuroj sur dekmil-voja tero.
Oldul' kun palmmantelo, ĉapelo, en boato,
Enneĝe fiŝas sola sur gela la rivero.

alia versio

La birdoj flugis for de l' montar' en pala helo,
Sur kampaj vojoj kovris sin spuroj sub ĉielo.
Oldul' kun palmmantelo, ĉapelo, en boato,
Enneĝe fiŝas sola sur la river' de gelo.

Elĉinigas



Minosun (Ĉinujo)

Zhang Ji (ĉ. 715 – ĉ. 779)

Nokta ankrejo ĉe la ponto Acero

Dum grakas korvoj en l' aero prujna, lun'
subiras.
Kontraŭ ŝiplampoj kaj aceroj bordaj dorm'
suspiras.
La templo Hanshan froste staras ekster
Gusu-urbo,
Noktmeze l' eksonor' en fremdan barkon sin
entiras.

Elĉinigis **Minosun (Ĉinujo)**



Fangfang (Ĉinujo)

Se revenus tempo...

Se revenus tempo,
mi tiame kaptus la okazon
kaj ne farus, kiel nun, nenion.

Se revenus tempo...
mi ĝin ŝparus tre zorgeme
kaj utiligus ĝin por lernado.

Se revenus tempo...
mi atentus ĉion ĉirkaŭ mi
kaj rakontojn belajn verkus.

Ve, malfeliĉe
ne ekzistas "se" en mia vivo
por mi penti kaj lamenti.

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Post la kverelo
mi sternas la tolaĵon.
Infanoj dormas.



Viaj ĉemizoj
Ŝipa velo ĝi estas.
Ŝipo ĉe l' kajo.



La ĉambro spiras.
Ludas niaj infanoj.
Gaja abeluj'.



Noktneĝero en
miaj okuloj ludas.
Gutujo kantas.

Iilir Zhiti



Braveco ne estas

Ne estas braveco militi por
forkapti tion kio ne vin apartenas,
Ne estas braveco, puni malfortunon,
por simple havigi bonojn al si mem.

Ne estas braveco la frenezeco,
kiu mortigan spiriton flambruligas,
braveco ja estas nur amo,
ankaŭ al iuajn seninterese.

Braveco ne estas devigi,
iun ekami vin pro bezono,
braveco estas resti en ties koroj,
eĉ se tion ili ne buŝesprimas.

Braveco estas ne lasi foriri,
tiun kiu amis vin tutkore,
ke pentu ne sentu timon,

pro tio perdita iutage.

Braveco estas ke vi ĝisfine,
ne forlasu bonajn amikojn,
eĉ kiam vi pensas ke nenie troviĝas,
amikeco ne forviŝita de vivo.

Braveco estas malfortulon vi defendu,
alie estus frenezeco, ne braveco,
ekde miloj da jaroj de monda ekzisto,
vi erare komprenas sencon de vorto.

Braveco ne estas fariĝi diktatoro,
kaj al popolo imponi vi sklavecon,
Braveco estas labori ĉiuhore,
por alporti al homoj feliĉecon.

Plaĝo, Durrës, 11-an e aŭgusto, 2017

Tradukis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKKVARA

La movoj de la ĉielo

§14-01

“Ĉu la ĉielo moviĝas? Ĉu la tero staras kvieta?
Ĉu la suno konkuras kun la luno por sia pozicio en la
ĉielo? Kiu regas ĉion ĉi tion? Kiu aranĝas ĉion ĉi tion?
Kiu do, sen agado, ilin puŝas kaj funkciigas? Aŭ ĉu
ekzistas ia mekanismo, kiu ilin pelas, ke ili ne povas
ekhalti? Aŭ ili moviĝas per si mem, ke ili ne volas

ekhalti? Ĉu la nuboj kaŭzas la pluvon? Aŭ la pluvo
kaŭzas la nubojn? Kiu kolektas la nubojn kaj faligas la
pluvon? Kiu do, sen agado, serĉas al si tian plezuron
kaŭzi ĉion ĉi tion? La vento venas de la nordo,
blovante jen orienten, jen okcidenten, aŭ kirligante
supre. Kiu faras tiajn en- kaj elspirojn? Kiu do, sen
agado, faras tiajn ventumadojn. Jen la demandoj, kiujn
mi permesas al mi meti al vi.”

“Venu,” diris la aŭguristo Xian Shao, “kaj mi
diros al vi. La ĉielo havas ses polusojn (t.e. nordo,
sudo, oriento, okcidento, supro kaj malsupro — trad.)
kaj kvin elementojn (t.e. metalo, ligno, akvo, fajro kaj
tero — trad.). Kiam la imperiestroj kaj la reĝoj sekvas
la ĉielon, la mondo estas en ordo. Kiam la
imperiestroj kaj la reĝoj malobeas la ĉielon, la mondo
estas en malordo. Kiam en la naŭ regionoj (t.e. la tuta
teritorio de Ĉinio en la praantikveco — trad.) regas
perfekta ordo, la virto kompletigas. Tiam la
imperiestroj kaj la reĝoj verŝas sian lumon suben kaj
ili estas respektataj de la popolo de la tuta mondo. Ili
estas nomataj ‘superaj regantoj’.”

§14-02

Kiam Dang, la ĉefministro de la regno Song,
demandis Zhuangzi pri la humaneco, tiu respondis:

“La tigro kaj lupoj havas sufiĉan humanecon.”

“Kiel vi povas diri tion?” demandis Dang.

“Se la bestoj kaj iliaj idoj sin amas reciproke, kial
do oni ne povas diri, ke ili ne havas la humanecon?”
respondis Zhuangzi.

“Ĉu vi povus diri al mi ion pri la perfekta
humaneco?” demandis Dang.

“La perfekta humaneco implicas nenian
korinklinon por iu ajn aparta persono,” respondis
Zhuangzi.

“Mi aŭdis, ke tiu, kiu havas korinklinon por
neniu, ne havas amon por iu ajn kaj sekve ne povas
havi filan sindonemon al siaj gepatroj. Ĉu ni povas
diri, ke la perfekta humaneco ne inkludas la virton de
sindona filo?”

“Ne,” diris Zhuangzi. “La perfekta humaneco
estas la supera stato de la virto, kaj tial la virto de la
sindona filo tute ne estas sufiĉa por priskribi ĝin. Tio
ne signifas, ke la perfekta humaneco superas la filan
devon, sed ke ĝi havas nenian rilaton al la lasta.

“Kiam iu vojaĝas suden ĝis la urbo Ying kaj jetas rigardon norden, li neniel povas vidi la monton Ming. Kial do? Ĉar li estas tro fore de ĝi. Tial, kiel oni diras, plenumi la filan devon el respekto estas facile, dum plenumi ĝin el amo estas malfacile; plenumi la filan devon el amo estas facile, dum forgesi la gepatrojn estas malfacile; forgesi la gepatrojn estas facile, dum igi la gepatrojn forgesi la filon estas malfacile; igi la gepatrojn forgesi la filon estas facile, dum igi ilin forgesi ĉiujn homojn en la mondo estas malfacile; igi ilin forgesi ĉiujn homojn en la mondo estas facile, dum igi ĉiujn homojn forgesi sin mem estas malfacile. Kun la virto postlasita, la reĝoj Yao kaj Shun lasis ĉiujn homojn en la mondo agi laŭ sia natura inklino, kaj ilia bonfara influo kaj graco daŭras dum dek mil generacioj sen ke la mondo tion konscius.

“Kial do ni devus profunde suspiri kaj abunde paroli pri la humaneco kaj la justeco? La fila devo, la homamo, la humaneco, la justeco, la lojaleco, la bonfido, la ĉasteco kaj la honesteco — ĉiuj ĉi tiuj ja estas ne pli ol tio, kio servas por konduki la homojn al sinkulturado; ili distordas la homan denaskan naturon kaj sekve tute ne indas esti laŭdataj. Tial, kiel oni diras, ‘tiuj, kiuj posedas la plej altan honoron, forĵetas siajn titolojn ricevatajn en la regno; tiuj, kiuj havas la plej grandan riĉecon, forĵetas la tutan posedaĵon de la regno; tiuj, kiuj havas la plej altan aspiron, forĵetas la famojn kaj la laŭdojn. Jen kial la Taŭo neniam ŝanĝas sian naturon.’”

ElĈinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Teo kaj amo

omaĝe al filmfestivalo de “Teo kaj amo”

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Ĉina te’
kun granda magi’
aromas tra la mondo
same kiel poezi’
en versa ebri’.

Tefoli’
flosas libere
en boligita akvo
jen ŝvelante leĝere
laŭplaĉe vere.

Bonodor’
elas dum moment’
en infuzado varma
kun gusto de orient’—
plenplena de tent’.

Ĉu verda
ĉu bruna teoj
prezentas ligiĝon de
diversgentaj ideoj—
ne pluas veoj.

Nune ni
per esperanto
esprimas aman senton
de te-kultura planto
por paca kanto.

L’ akordo
monda de l’ homo
regos tra kontinentoj
jen en alvoka sono—
“vojo kaj zono”.

En razejo

el la rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Afanti
pro varma veter’

volis razigi l' kapon
kaj iris al la razej'
por tonda afer'.

Verŝajne
ne estis sperta
la razist' en metio,
ĉar lia man' mallerta
en ag' malcerta

vundetojn
kaŭzis sur la kap'
de Afanti kelkloke
per la razila skrap'
pro malzorga frap'.

La razist'
metis zorgeme
vaton sur la vundetojn.
Sed Afanti senĝeme,
senkoleltreme



stariĝis
kaj rigardis sin
en la spegul' dirante:
“Ho! Vi ja fascinas min
per via ŝat-klin'.

Vi plantis
blankan kotonon,
ja lerte kiel majstro,
sur mian kapduonon
kvazaŭ gazonon.

Nu, bone,
aranĝos mi mem

la alian duonon
de la kapo kun zorgem'
per lina dissem'.”

Eto (Ĉinujo)

Mia kunvojaĝanto

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Vi kaj mi
sur vivovojo
renkontiĝis hazarde
por la unua fojo
ĉe streta rojo.

Tiam vi
kun korpo eta
ekis homan vojaĝon
en manier' vegeta
per paŝ' malpreta.

Komence
vi plendis al mi
pri mia ir' rapida
kelkfoje jen kun plorkri'
jen sen energi'.

Tiam vi
ege bezonis
mian helpeman manon
kaj mi ofte ĝin donis
ĉiam vin spronis.

Kun tempo
fariĝis vere
stabilaj viaj paŝoj.
Vi iradis leĝere
kaj eĉ fiere.

Vi multe
plenkreskis alte
kaj aspektis tre sane,
vi marŝadis ekzalte

plue senhalte.

Post jaroj
mi elĉerpita
min sentis senkonscie
en ago tre hezita,
ne plu ekscita.

Nuntempe
mi jam senila
ne povas iri glate
nek antaŭen trankvile
marŝi facile.

Devancis
min jen vi jame
per longaj firmaj paŝoj.
Mi ĝojas por vi same,
laŭdas vin ame.

Rigardas
jen mi de fore
la dorsfiguron de vi,
dum mi lamas langvore
kaj malfervore.

Deziras
mi al vi ido
antaŭenmarŝi pluen
por pli granda merito
jen kun memfido.

Jadranka Miric (Serbujo)



Loka biciklanta konkurado

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Balonoj
diverskoloraj
flugas tien alien.
Gaje krioj infanaj
eĥas. Tre ĝojaj.

Sur stratoj

nur biciklantoj.
Ja, ekis nova sezon',
hastas ĉi konkurantoj.
Aŭdiĝas kantoj.

Bonveno
estis skribita
sur ligno ŝildo bela,
cikloforme ĉizita,
ruĝe farbita.

Viciĝas
homoj brue. Ve.
Volontuloj apenaŭ
tenas ilin sufiĉe
estu surstrate.

Finfine
brava venkinto
pasas celon. Kriaĉoj
atingas ĝis pinto.
Venas gajninto.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Zhuang Qixiong (Ĉinujo)



Nankino en sonĝo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Ĝoj'
fuma sur sopira voj'
Mi flirtis
ĉirkaŭ verda roj'.

Flu'
rivera kun pluva bru'.
Mi ĝemis
pro soleca sku'.

Kor'
sufera en sonĝa hor'.

Al kiu
pri senveka plor'?

**Deskses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Andrej Pozdnjakov

En tiu teksto aŭtoro uzis citaĵojn el muzika albumo "Sodade" ("Resopiro") de fama kantistino Cesária Évora el Kabo-Verdo (lando sur insuloj en Atlantiko apud okcidenta bordo de Afriko). Cesária Évora kantas en kreola dialekto de portugala lingvo.

Dorman senbruon de mateno eksplodigas majora akordo el poŝtelefono. Kreola melodio "Mae Velha" el insuloj de Kabo-Verdo en vintra krepusko kaj loĝejo en kutima rusia urba distrikto. Manoj mem etendas malŝalti tiun "viglecon", kvankam kiam mi aranĝis ĝin kiel vekilon, logiko estis ĝuste en tio, ke gajaj akordoj forpelu matenan malbonhumoron.

Malkontente turniĝas edzino, ŝi levos sin pli malfrue, en instituton ŝi povas alveturi al tagmanĝo... Sed mi estas oficisto, mi ne povas permesi al mi tian lukson, mi devas veni je la naŭa. Mi mallaŭte iras al kuirejo, fermas post mi pordon de dormejo.

Mi fumas unuan matenan cigaredon, dum tekaldrono bolas. Kapo komencas nemulte turniĝi, kaj rigardo haltas je brika duetaĝa domo apud senfinaj grizaj garaĝoj, sur kiu pendis reklamŝildo "Iloj por ĉiuj". Malgraŭ ke mi povas konsideri min al ĉi "ĉiuj", sed ĉe mi ial neniam aperis deziron iri kaj elekti por mi konvenan ilon. Suno malrapide supreniras, sed pro tio ne iĝas pli lume, nur malhele griza ĉielo transformiĝas en la malpure griza.

Klako de tekaldrono rompas stuporon. Cigaredrestaĵo flugas tra malfermita ĝiceto. Granda kruĉo, kulero... Ne, hodiaŭ estos du kuleroj da kafo de penema muelo. Strio de bolanta akvo levas ondon de aromo. Tamen tia

"pseŭdokurita" kafo estas pli bone ol solvebla kafo... Mi metas subtason sur kruĉo, ke kafo infuziĝu pli forte...

Ŝlosilo faras du turnojn en seruro, mi trairas sep interŝtuparojn. En enirejo estas duonlumo pro maldiligenta suno kaj pro ŝparemaj najbaroj, kiuj estingis lumon. Ŝaltilo estas kaŝita en loko, kiun scias nur ili. Du sekundoj apud pordo de enirejo antaŭ eliro al mondo de homoj.

– Tr-r-r-rit, – pordo parolas batfalgante de malalta ŝirmilo super enirejo glacipendaĵojn.

Aperas suspekto, ke mi estas unua, kiu eliras el enirejo.

Ekstere kortisto en oranĝa veŝto deĵetas neĝon el sub radoj de multenombraj najbaraj aŭtoj. Unu aŭto komencas kriegi kaj histerie palpebrumi per ĉiuj lampetoj. Mi kaj la kortisto diras saman insultaĵon, sed en niaj voĉoj estas absolute diversaj nuancoj de malĝojo. Mi devas pli rapide turni min post angulo, ke elektra kaj multvoĉa akutkrio de signalilaro ne enpenetru en orelojn tiel senindulge.

Mi devas trairi sesdek sep paŝojn de angulo de domo ĝis strato. Ĝia bruo alproksimiĝas al mi post ĉiu paŝo. Mi necese surdigi tiujn sonojn: akutkrio de taksioj, bruo de ŝarĝaŭtoj kun malbone fiksita ŝarĝo, zumo de trolebusoj... Poŝtelefono kuŝas en dekstra poŝo de jako, dratetoj kaj kapaŭdiloj kuŝas ie samloke. Rapidu, rapidu! Pri tio, ĉu mi sukcesos enpiki la dratetojn al la telefono kaj la kapaŭdilojn al oreloj ĝis tio, kiam mi faros sesdek-sepan paŝon al strato, dependas mia vivo! Fingroj palpas sur la telefono butonon "PLEY". Kreolaj flutoj batalas kontraŭ aŭta bruo. Sesdek ses, sesdek sep...

– *Nh'amor e doce, nh'amor e certo, nh'amor ta longe, nh'amor ta perto, –* avino-kreolino kantas. Sesdek ok, sesdek naŭ...

Haltejo estas plena per malserenaj homoj, iuj ankaŭ havas kapaŭdilojn. Verŝajne iu el ili ankaŭ aŭskultas sian muzikon el Kabo-Verdo... Verŝajne ni nun aŭskultas saman kanton... Tamen strata bruo penetras tra muziko, kiun oni kreis ie en varmaj insuloj en Atlantiko.

– Dz-z-z, – mortante antaŭ haltejo parolas alveturinta trolebuso kaj tuj ekspiris neafable malfermante pordojn. – Pŝ-ŝ-ŝ...

Kun ĉiuj mi sturmas ejon de la trolebuso, mi devas sukcesi al oficejo je la naŭa... Kiel mi suspektas, la aliaj ankaŭ volas sukcesi, tial malgraŭ lirika muziko en niaj kapaŭdiloj ni pasie batalas por nia amplekso de spaco en la trolebuso. Trankviligas nur tio, ke tiel mi traveturos nur tri haltejon, sur centra placo eliros duono de miaj malamaj samvojuloj.

– Atenton! Pordoj fermiĝas, sekva haltejo estos “*Ilhéu Branco*”*, – por io informas aŭtomata laŭtparolilo per senemocia virina voĉo.

– Pŝ-ŝ-ŝ, – ree parolas la trolebuso kaj komencas pligrandigi rapidon, sed al ĝi malhelpas strataj ŝtophaltoj. – Dz-z-z-z... Ur-ur-ur-ur, – malkontente murmuris ĝi dum devigita halto, kaj ĉiuj pasaĝeroj sentas per piedoj ĝian malkontenton. – Dz-z-z-z...

Antaŭ mia vizaĝo estas griza palto de virino, kiu staras je unu ŝtupo pli supre. Mi fermas okulojn kaj mergiĝas en muzikon.

– *Sangue de Beirona, Sangue de Beirona...*
– kantas ĥoro subkantante al tiu avino-kreolino...

– Haltejo “*Ilhéu Branco*”, – parolis aŭtomata virino, kaj la trolebuso interrompante ŝin ree malkontente malfermas pordojn.

El ejo de trolebuso neniu eliras, kaj homoj, kiuj staras sur haltejo, pasie puŝas nin, tiujn, kiuj povis eniri sur antaŭa haltejo.

– Ur-ur-ur-ur, – ial ree murmuris la trolebuso kaj fermas pordojn. – Pŝ-ŝ-ŝ...

– Atenton! Pordoj fermiĝas, sekva haltejo estos “*Ribeira Brava*”, – rapide parolas la

virino-laŭtparolilo.

Grizan ĉielon antaŭ okuloj anstataŭas ĉielblua jaketo de knabino-lernantino.

Rigardi tion mi ankaŭ ne volas, tial mi fermas okulojn...

– *J'a'm conchia Sao Vicente, Na se ligria na se sabura*, – post vigla preludo de trumpetoj malĝoje kantas avino Cesária.

– Haltejo “*Ribeira Brava*”, pŝ-ŝ-ŝ, – konkuras je laŭteco la trolebuso kaj ĝia parto, la virino-laŭtparolilo.

El ejo de la trolebuso eliras kvin homoj, sed sur haltejo ne estas dezirantoj eniri al ni. Verŝajne homoj eniris al alia trolebuso, kiu alveturis de perpendikla strato.

– Atenton! Pordoj fermiĝas, sekva haltejo estos “*Palmeira*”, – timante ne sukcesi rapide parolas la virino-laŭtparolilo, sed la trolebuso ial ne rapidas fermi pordojn kaj nur malkontente murmuris transdonante al matenaj pasaĝeroj sian tremon.

– Pŝ-ŝ-ŝ, – fine ĝi elspiras kaj startas sed ial ne ĉesas murmuri...

Spacon, kiun liberigis la kvin elirintaj pasaĝeroj, tuj okupas konkurencanto-samvojuloj. Sed mi ne esperis al plena venko, mia progreso estas unu ŝtupo supren (certe sur ŝtuparo de trolebuso).

– Viro, ĉu vi nun eliros? – demandis min tiu sama virino, la posedantino de griza palto. De dorso ŝi estis pli simpatia...

– Mi ellasos vin, – mi murmuris kaj malleviĝas je ŝtupo malsupren.

– Haltejo “*Palmeira*”, pŝ-ŝ-ŝ, – ree provas superkrii unu la alian la aŭtomata laŭtparolilo kaj la trolebuso.

Mi elsaltas eksteren kaj staras dekstre de malpuraj pordoj sur grizan neĝon. Miaj samvojuloj tumulteme forlasas ejon de la trolebuso, kaj mi estas tre danka al ili pro tio.

– Atenton! Pordoj malfermiĝas, sekva haltejo estos “*Porto Inglês*”, – ial rapidas la virino, kaj mi apenaŭ sukcesas ensalti tra fermiĝantaj pordoj.

Mi ĉirkaŭrigardas al flankoj. Post kajuto de ŝoforo estas sola ne okupita sidloko. Ĝi lokiĝas sur rado, kaj ĉieaj maljunulinoj kutime ignoras ĝin, per tio certe ofendas la sidlokon. Sed mi estas ne tia. Mi komforte sidas kaj enmetas kapaŭdilojn en orelojn, kiuj elfalis dum mia ekstra evakuo.

– *Oh Mar, Mar azul, subi mansinho, Lua cheia lumiam caminho*, – tre pasie kriis al mi la malĝoja kreolino.

Mi rigardas tra frostiĝinta fenestro kun degelintaj “kalvoj”, kaj la trolebuso haltas en vica ŝtophalto antaŭ semaforo kaj pro tio furioze murmuris. Pli malsupre ol mi lokiĝas tegmentoj de “dekstra-direktitaj” aŭtoj, kaj mi vidas ŝoforojn kaj pasaĝerojn, kiuj sidas post ili. Jen viro laŭ ritmo de ia kreola muziko en ejo de aŭto frapas direktilon, kaj jen griza posedanto de lipharoj preskaŭ kuŝis per mentono sur direktilon, kaj jen simpatia juna virino kun streĉe kolektitaj je vosto haroj ne returniĝante riproĉas sian petolantan idon en infana apogseĝo...



Ilustraĵo de Igorj Ĥomjakov

– Dz-z-z-z. Haltejo “*Porto Inglês*”. Pŝ-ŝ-ŝ, – tre harmonie kaj sinsekve parolas la trolebuso kaj la virino-laŭtparolilo.

Sur haltejo eliras kelkaj homoj, post tio en ejon de trolebuso eniras tri maljunulinoj vestintaj sin per grizaj kaptukoj. Mi ne timas ilin, ili ne sidos sur radon, kaj nudpieda avino Cesária ĝuste kantis al mi “*Nha canção ka tem medida*”, kaj mi akceptas ŝiajn vortojn kiel signalon al tio, por ke enpremiĝu al jako kaj fermu okulojn.

– Atenton! Pordoj fermiĝas, sekva haltejo

estos “*Boa Vista*”, – fine diras la aŭtomata virino, kaj pordoj kun siblado fermiĝas...

Estas interese, pri kio oni sopiras en insuloj de Kabo-Verdo? Verŝajne pri io eterna... Pri tio, kiel disiĝas geamantoj, aŭ pri tio, ke vivo pasas, aŭ kial mankas feliĉo... Sed pri kio sopiras ni? Pri tio, kiel disiĝas geamantoj, pri tio, ke vivo pasas, pri tio, kial feliĉo mankas... Nu ankaŭ pri tio, ke ni havas malmulte da suno, en Kabo-Verdo, mi opinias, tiaj problemoj ne estas... Kvankam voĉo de la avino-kreolino estas tutegale malĝoja...

– *Quem mostra' bo ess caminho longe?* – la kreolino kantas, kaj mi tute kredas al ŝia sopiro.

– Haltejo “*Boa Vista*”, – senemocie interrompis ŝin la aŭtomata virino, kaj mi ĵetas min el la trolebuso tra pordoj.

Ekstere min blindigas hela suno sur fono de blanka ĉielo, kaj piedoj sentas sablon prilavitan per Atlantiko...

– Sodade... Sodade... Sodade... – voĉo iĝas pli laŭte, kaj mi komprenas – absolute tutegale ĉu mi sukcesos hodiaŭ matene al oficejo je la naŭa aŭ ne.

noto:

* *Ilhéu Branco, Boa Vista* – insuloj de Kabo-Verdo. *Ribeira Brava, Palmeira, Porto Inglês* – urboj en Kabo-Verdo.

Esperantigis



Igorj Ĥomjakov (Rusio)



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto, Chongqing, 400023, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm

